



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 5/6
1968

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
34-a (39-a) jaro
Monata

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

JARRAPORTO 1967.

La Liga Konsilantaro konsistis de la jarkomenco el:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz.

Vicprezidanto: Kjell Gustavsen.

Generala sekretario: Tom Arbo Høeg.

Sekretario: Signe Haug.

Kasisto: Karl Ekhaugen.

Estraranoj: Olav Rygg, Jan Ekhaugen.

Anstataŭantoj: Harda Danielsen, Alfred Skyberg, Frank Aasheim.

Ceteraj Konsilantaranoj: Johannes Flod-

mo, Mo i Rana, Fin Hole, Mandal,

Trygve Kvalvåg, Stavanger, Ragnv.

Rian, Trondhejmo, Johan Hammond

Rosbach, Sarpsborg.

Revizoroj: John Selbekk, Karin Sandberg.

La ĝenerala sekretario, kiu dum la lasta jaro ne funkciis, kaj du aliaj konsilantaranoj, ne deziris reelekton. La Landa Kunveno 14.—15. Majo elektis jenan novan Ligan Konsilantaron:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz.

Vicprezidanto: Kjell Gustavsen.

Generala sekretario: John Berggreen.

Sekretario: Signe Haug Korstvedt.

Kasisto: Karl Ekhaugen.

Estraranoj: Olav Rygg, Kirsten Ek.

Anstataŭantoj: Harda Danielsen, Alfred Skyberg, Otto Koren.

Ceteraj Konsilantaranoj: Doris Birkelund, Bergen, Trygve Kvalvåg, Stavanger, Herolv Olsen, Tromsø, Ragnv. Rian, Trondhejmo, Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg.

Revizoroj: John Selbekk, Karin Sandberg.

Post la forpaso de Ragnv. Rian la Liga Konsilantaro nomis Oddmund Rykkvin observanto en lia loko.

Landa Kunveno okazis 14.—15. Majo en Sauda dum la 40a Norvega Esperanto-Kongreso. La kunveno i. a. decidis statutŝanĝon rilate al reprezentado kaj voĉdonrajto dum la landaj kunvenoj, alprenis 4 rezoluciojn (pri la pasivaj participoj, pri nenecesaj neologismoj, pri Esperanto en turismo kaj pri la Jaro de Internacia Kunlaborado), starigis komisionen por studi la situacion de la movado en Norvegujo kaj proponi eventualajn ŝanĝojn en la labormetodoj, precipe por aktive altiri junulojn (la komisiono, prezidanto: Frank Aasheim, raportas ke ĝi faris duonon de la laboro), kaj elektis du honorajn membrojn: Bjørn Ottesen kaj Aagot Sletterød.

ADMINISTRADO

Estrarkunvenoj. Okazis 7 estrarkunvenoj (6 en 1966), kaj oni protokolis 88 punktojn (72 en 1966).

Cirkuleroj. La Estraro elsendis al la kluboj kaj distriktoj 7 cirkulerojn, i. a. kun la subskribfolio por U.N.O. kaj kun invito al mendoj de donac- kaj propagandabonoj al Norvega Esperantisto. Cetere oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko «Sciigoj de (daŭr. p. 68)

Por novuloj kaj lernemuloj
CIRKAŬ LA MONDON

Red. H. Fridén...

Darĝilingo, urbeto plej alta en la mondo kun 25 000 loĝantoj. «Darĝiling» signifas «Loko de la fulmotondro». Somera Edeno de la britoj en Hindujo. Sed nebulis kaj neĝis dum mia restado. Hoteloj ĉie, kaj memorajvendejoj. Intere viva en la bazaro, kiel nomiĝas la kvartalo de la vendejoj.

Dimanĉo! Alvenas la loĝantoj el la ĉirkaŭaj valoj kaj de la proksimaj montoj. Mongoloj kun altaj vangostoj kaj hinduaj kastmarkoj. Ĉinaj harligajoj pendantaj el sub hindaj turbanoj. Ĉinaj paltoj kun manikoj pli longaj ol manoj. Larĝvizaĝaj lepĉanoj, malgrandaj tibetanoj, fortaj nepalanoj.

La virinoj estas la familiaj ŝparbankoj kaj reklamtabuloj. Ili pendigas la tutan familian havaĵon ĉirkaŭ siaj koloj, brakoj, maleoloj, fingroj, piedfingroj, al siaj oreloj kaj nazoj. Oraj kaj arĝentaj moneroj povas esti aĉetataj kun alfiksitaĵoj ringetoj, per kiuj ili povas esti pendigataj je ŝnuro kaj uzataj kiel ornamaĵoj. La pezaj portataj de tiuj virinoj estas grandegaj, sed ili volonte suferas kaj ju pli da oro kaj arĝento ili portas, des pli feliĉaj kaj fieraj ili estas. La nazoringoj estas tiel grandaj, ke ili devas ilin forpreni kiam ili uzas naztukon... se ili tian havas.

VORTKLARIGO:

urb-eto, småby
loĝ-ant-o, beboer
fulmo-tondro, lyn-torden, tordenvær
Somera Edeno, sommer-paradis (Eden)
nebul-i, være tåket, «å tåke»
neĝ-is, snødde
memor-aĵ-ven-ej-oj, souvenirbutikker
memor-aĵo, erindringsting
vend-ejo, salgssted, butikk
ĉirkaŭ-a, omliggende (kiu estas ĉirkaŭ)
vang-osto, kinnben
har-lig-aĵo, flette, (hårpisk, eg. hårbunt)
el sub, fra under
palto, frakk
manik-o, ærme
reklam-tabulo, reklamebrett
pend-ig-as, henger (transitivt v.),

igas pendi, bringer til å henge
hav-aĵo, eiendom (det de har)
maleol-o, ankel
pied-fingro, tå
mon-ero, mynt
esti aĉet-at-a, kjøpes
esti pend-ig-ata, henges
esti uzata, brukes
pezoj portataj, vekt som bæres
ata, pres. part. passiv, uttrykker det
generelle, det gjentagne
el. som nå finner sted (eng.: Which is
being done)
al-fiks-ita, tilfestet (perf. particip passiv)
volonte, gjerne
pez-a, tung
pez-oj, tyngder
suferi, lide
fier-a, stolt
tiel granda, så stor
naz-tuko, neseduk (lomme-tørkle)
tian, en sådan (objektsform)

Studenta Esperanto-societo
en Oslo.

La 15an de Majo fondiĝis ĉe la Universitato en Oslo Studenta Esperanto-societo. Prezidanto fariĝis Ole Skaane, sekretario Harald Støp-Bowitz, estraranoj Karin Fjellhammer kaj Lars Groth. La societo intencas en la aŭtuno komenci informadon kaj varbadon inter la studentoj.

Ni proponas:

Elektitaj paroladoj kaj prelegoj
de Ivo Lapenna
Bindita kr. 27,00
«Martín Fiero» de José Hernández
Nacia eposo de Argentina
Bindita kr. 36,00
Aldonn 10 % por sendkostoj
Eldonejo Esperanto, Boks 942, Oslo

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
Sarpsborg. — (Limdato por manuskripto: la 20 en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,
1/8 p. kr. 19,—.

FARIGHU M-A!

Tuta malgranda armeo de pli ol 3400 lokaj kaj fakaj delegitoj estas je dispono de la membraro de U.E.A. por ĉiaspekaj praktikaj servoj. Utiligu la lingvon por viaj praktikaj celoj pere de la delegita reto de Universala Esperanto-Asocio — unika en la mondo — kaj pere de la 24 fakaj aŭ specialigitaj organizaĵoj aliĝintaj al U.E.A. aŭ en kontraktaj rilatoj kun ĝi.

Ankaŭ vi povas fariĝi fakdelegito. Aliĝu al U.E.A. kiel Membro-Abonanto kaj fariĝu fakdelegito por via fakoj! Per tio vi helpas al vastigo de la praktikaj servoj de U.E.A. kaj samtempe mem havos pli da eblecoj utiligi la lingvon por praktikaj celoj.

Donacoj al la kontorfondajho

Pli frue	kr. 230,00
Løten Esperantoklubb	» 5,00
Bj. Aandahl	» 15,00
O. Pehrson	» 50,00
Kr. Mortensen	» 5,00
Bodø Esperantoklubb	» 70,00
C.S.B.	» 30,00
	kr. 405,00

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Kolektu forton!

La somero jam venis. La granda epoko de la esperantistoj. Tutan vintron ni senlace laboradis por perfektigi. Nun ni utiligu la atingitajn rezultojn.

Ni partoprenos kursojn, kongresojn, vojaĝojn. Ni lernos pli. Ni akiros novajn amikojn. Ni konversacios. Ni perfektigos. Ni kolektas forton.

En la aŭtuno ni utiligu tiun forton. Tiam ni havos antaŭ ni tutan vintron por senlace laboradi por perfektigi. Post la vintro ja venos nova somero, kaj tiam ni povos vojaĝi, kongresi — por kolekti forton por nova sezono.

Bonan someron!

La Masonisto 85-jara

La 5-an de Junio «Masonisto», Gustav Johannessen, Hamar, fariĝis 85-jara. Dum tri-kvar jardekoj li estis unu el la gvidantoj de nia movado en Hamar. Lia estas la merito, kiam la Librofako de N.E.L., el kiu fariĝis la Eldonejo, fariĝis komerca entrepreno. Kiam foje iu kritikis ion rilate al la tiama Librofako, la karakteriza respondo de la Masonisto estis: «Ni ne ludas butikon en Hamar!»

Al la jubileulo niajn plej korajn gratulojn!

LEIF SANDBERG 65-JARA

Ni gratulas ankaŭ al Leif Sandberg, Oslo, kiu estos 65-jara la 14-an de julio. Sandberg estas aktiva esperantisto de pli ol 35 jaroj, kaj estis i.a. prezidanto de Klubo Esperantista en Oslo, sed eble plej bone konata kiel komponisto de Esperantaj marŝoj kaj kantoj. JHR.

OLAV REIERSØL 60-JARA

Profesoro pri matematika statistiko, d-ro Olav Reiersøl fariĝis 60-jara la 28an de Junio. Prof. Reiersøl estas aktiva esperantisto de pli ol 20 jaroj, li estis kunlaboranto de fakaj terminaroj, rektoro de la Somera Universitato dum la 37a Universala Kongreso de Esperanto en Oslo en 1952, kaj li ĵus subtenis la starigon de studenta Esperanto-societo ĉe la Universitato en Oslo.

Postfeste niajn korajn gratulojn!

(daŭr. de p. 65)

N.E.L.» en Norvega Esperantisto. Tial nur 4 cirkuleroj estis sendataj al la rektaj membroj.

Oficejo. La tenado de la oficejo estas ebla nur per la malavara subtenado flanke de membroj per la oficeja fondaĵo. Pluraj pagas libervolan monatan aŭ jaran kontribuon. La oficejo servas samtempe por la Eldonejo Esperanto A/S kaj por Klubo Esperantista en Oslo, kiuj pagas partojn de la luprezo. La malnovan oficejon oni konservas kiel provizejon. La oficejon estris la prezidanto kunlabore kun la ĝenerala sekretario. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laboron dividis inter si la estraranoj. La Ligo, la Eldonejo kaj la Klubo havas komunan telefonon. — Oni aĉetis de Tharald Dybing modernan multobligilon kaj duonelektran skribmaŝinon.

La Oficeja Fondaĵo dum la jaro donace ricevis kr. 1501,15 (en 1966 kr. 1511,10). La Estraro kore dankas al la kontribuantoj.

La Financa Komisiono, konsistanta el John Berggreen (prez.), Kirsten Ek, Johan Matland, Alfred Skyberg (mem-

broj), daŭrigis sian laboron. Oni daŭre dissendis petskribojn kaj publikigis artikolon en Norvega Esperantisto. La neta gajno estis nur kr. 51,17. La laboroj estas daŭrigataj, kaj oni konsideras novajn metodojn.

Kunlaboro kun N.E.F.A. Stariĝis interkonsento kun Norvega Esperantista Fervoĵista Asocio ke ĝi disponu unu paĝon en ĉiu numero de Norvega Esperantisto kiel sian oficialan organon, ĉiuj membroj de N.E.F.A. fariĝu abonantoj de Norvega Esperantisto, kaj la kaso de N.E.F.A. pagu kr. 300,00 kiel kontribuon al la preskostoj.

DISTRIKTOJ, KLUBOJ KAJ MEMBROJ

Distriktoj. Neniu nova distrikta organizaĵo fondiĝis. Precipe Okcidenta Distrikto bone laboris, Orienta, Meza kaj Nordlanda Distriktoj estis malpli aktivaj. — Nord-Norvega Esperanto-Distrikto ne funkcias.

Klubo. Je la jarfino 1966 N.E.L. havis 22 aliĝintajn klubojn. Neniu klubo fondiĝis, sed 2 kluboj malaperis. Je la jarfino 1967 N.E.L. sekve havis 20 klubojn.

MEMBROSTATISTIKO:

Bergen, La Esperantoklubo de, Ok.D.	31
Bodø Esperantoklubb, N.D.	10
Gjøvik, Klubo Esperantista de, Or.D.	5
Halden, Ascendo, Or.D.	10
Hamar, La Norda Stelo, Or.D.	16
Harstad, Noktomeza Suno, N.N.E.D.	9
Haugesund, Mara Vento, Ok.D.	46
Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok.D.	6
Kristiansands Esperantoklubb	13
Løten, La tri verdaj steloj de, Or.D.	5
Mandal, Esperantoklubo en	8
Mo, La Esperantoklubo de, N.D.	5
Odda, La Glaciario, Ok.D.	6
Oslo, Klubo Esperantista en, Or.D.	131
Sarpsborg, La Urso, Or.D.	17
Sauda Esperantoklubb, Ok.D.	19
Skorovatn, Skorovas Esperantoklubb, M.D.	5
Skudeneshavn, La Granda Ideo, Ok.D.	10
Tromsø, La Norda Lumo, N.N.E.D.	6
Trondhejmo, Grupo Esperantista, M.D.	36
Sumo:	394
Individuaj membroj	136
Entute:	530

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu la klubo apartenas.

Specifo de la membraro laŭ kategorioj:

Klubanoj:

Ordinaraj	312
Junulaj	9
Familiaj	54
Junaj familiaj	13
Honoraj	3
Dumvivaj	2
Subtenantaj	1
-----	394

Individuaj membroj:

Rektae aliĝintaj membro ordinara	112
» » » junulaj	9
» » » familiaj	3
-----	124
Dumvivaj membroj	6
Subtenantaj membroj	6
-----	530

Krome pagis 3 kontribuaj membroj. — Entute la membronombro montras perdon de 3,8 % kompare kun la antaŭa jaro.

KLUBLABORO

Superrigardo. (Ĉar nur 19 el la 20 kluboj sendis ĉiujn devigajn raportojn, kelkaj el la subaj ciferoj kredeble estas tro malataj.) Suma membronombro je la 1/1 1967: 405. Aliĝoj: 17, ekŝigoj: 31. Membronombro je la 31/12: 394. — Okazis 132 klubkunvenoj, meznombro ĉeestis proks. 53 %; plurfoje estas raportita 100-procenta ĉeesto. — Raportiĝis 42 estrarkunvenoj, 11 festoj, ekskursoj k.t.p. En 4 kluboj laboris 5 studrondoj kun 29 membroj. 8 kluboj raportas pri biblioteko kun 322 volumoj. 73 klubanoj posedas elementan ekzamenon, 50 superan, 2 instruistan.

La kluboj kontentige raportadis dum 1967, sed la Estraro ankaŭ zorge urĝigis pri mankantaj raportoj. La intereso inter la membroj grandparte ŝajnas esti bona. — Oni decidis en 1968 eksperimente postuli nur duonjarajn raportojn de la kluboj.

Teatra Sekcio, gvidata de C. Støp-

Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj, kiuj petis pri tio.

STUDLABORO

Kursgvidantoj. Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1967, sed en kelkaj lokoj okazis kursoj gvidataj de lokaj fortoj.

Kursoj. Raportiĝis 5 kursoj por komentantoj kun sume 35 kursanoj, en Bergen, Haugesund, Løten, Sauda kaj Trondhejmo, kaj 5 kursoj por progresantoj kun 25 kursanoj en Bergen, Haugesund kaj Oslo. Kredeble okazis ankaŭ kelkaj kursoj, pri kiuj raportoj ne estas ricevitaj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finiĝis.

Korespondaj kursoj. La Sekcio pri Koresponda Instruado estis gvidata de Else-Margrethe Müller, Trondhejmo. Estis bona kunlaboro kun «Folkets Brevskole», kiu uzas la kursojn de N.E.L., sed mem prizorgas administradon kaj anoncadon. N.E.L. havigas instruanton kaj ricevas raportojn pri lernantoj, kiuj plenumas la kursojn ĉe «Folkets Brev-

skole». Ankaŭ Norvega Blindula Asocio utiligas la kursojn. — Ĉe N.E.L. aliĝis al la unua parto 23 kursanoj, al la dua parto 4. Oni daŭre liveris la kursojn por reduktita tarifo al ĝeĵunuloj; 1 lernanto en la unua parto kaj 1 en la dua parto estas tiaj. Ĉe «Folkets Brevskole» aliĝis al la unua parto 15 kursanoj, al la dua parto neniu. — 4 el la kursanoj estas varbitaj de membroj de N.E.L. Ĉiuj, kiuj plenumis la unuan parton, ricevis duonjarian abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. — Instruis E. Holten kaj L. K. Hunnes, por ĝeĵunuloj L. Anjer, por «Folkets Brevskole» Ragnv. Rian, kaj post lia forpaso L. K. Hunnes, por blinduloj H. Kartrud. — La kurso estis 4-foje anoncata en la semajna gazeto «Hjemmet» dum la aŭtuno. — Ĉar la provizo de la kursuletoj proksimiĝas al elĉerpiĝo, L. K. Hunnes komencis reviziadon por nova eldono.

Gazeta kurso aperadis en 1967 en Akershus Arbeiderblad kaj Rogalands Avis. Plie Johan Hammond Rosbach sukcesis aperiĝi aparatan kurson, kiun li verkis, en Sarpen kaj en Smaalenenes Amtstidende.

Perfektiga studado. La Ekzamena Komisiono ankaŭ dum 1967 korektadis taskojn por interesigantoj. Vendiĝis kelkaj kajeroj de ekzerctaskaroj. Oni aparte klopodas igi la membrojn studi por ekzameno.

Ekzamenoj. Ordinara ekzameno okazis en Junio en Haugesund, Oslo kaj Trondhejmo. 2 kandidatoj plenumis la elementan ekzamenon, 4 la superan. La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Jens Schjerve kaj Elfrid Vormdal (membroj). Ekzistas 6 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Haugesund, Sauda, Tromsø, Trondhejmo, Østfold, kaj 7 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.

INFORMADO

Informa Fako (Komisiito pri informado: Ludvig Anjer). La komisiito i. a. per cirkulero klopodis instigi la klubojn al varba aktiveco. Li partoprenis la diskutadon pri informadaj temoj dum la

kongreso en Sauda, kunredaktis du rezoluciojn kaj poste distribuis ilin al la norvega gazetaro. Li partoprenis ankaŭ la kunvenon de la Informaj Fakoj en Rotterdam. Fine li prizorgis serion da anoncetoj pri Esperanto en ĉefurbaj gazetoj.

La Propaganda Fondaĵo ricevis donacojn de entute kr. 570,00. Bankinterezoj estis kr. 371,64. El la fondaĵo oni uzis kr. 1065,49. La fondaĵo posedis je la jarfino kr. 9167,88.

«Esperanto-nytt». Ĉar la komisiito pri informado pro eksterordinara profesia okupiteco ne havis okazon fari decidajn paŝojn por ĝia reaperigo, tiu informbulteno ankaŭ dum 1967 ne reaperis.

Informbroŝuroj. Oni daŭre uzadis «Esperanto-nytt» n.ro 3/1961 (kaj parte ankaŭ aliajn numerojn) kiel ordinaran broŝuron. Plie oni uzis la 900 ekzemplerojn de la «malgranda flava» broŝuro. Oni presigis reviziitan eldonon de «Esperanto-nytt» n.ro 3/1961 kiel aldonon al Norvega Esperantisto n.ro 9/10 kaj faris represaĵojn de ĝi en nombro de 10 000. El tiu stokojn tuj eliris proks. 1 000. — La faldfolio «Velkommen til Esperanto-bevegelsen» estis disdonata al ĉiuj kursanoj por montri al ili la avantaĝojn de membreco.

Gazetara Servo, gvidata de Ludvig Anjer, elsendis al ĉiuj norvegaj ĵurnaloj 7 bultenojn kun sume 23 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj; 5 el la bultenoj aperis en ambaŭ oficialaj lingvoformoj. Oni daŭre abonis eltondaĵojn per la firmao «Argus». Oni registris 211 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo kaj 269 novaĵojn kaj artikolojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 480 aperigojn (480 ankaŭ en 1966) en 99 gazetoj kaj revuoj (103 en 1966). Atakoj al Esperanto ne okazis. Pluraj kluboj aperigis raportojn pri siaj kunvenoj kaj aliaj okazaĵoj en lokaj gazetoj. Pluraj kluboj povas montri al sukcesaj klopodoj rilate al la gazetaro ankaŭ en 1967.

Radio (Komisiito: R. Bugge-Paulsen). La 14an de Aprilo Johan Hammond Rosbach faris 10-minutan memorigan paroladon «Mannen som skapte Esperanto, dr. Ludwik Zamenhof». La 5an de Januaro

okazis en la televido 1-minuta intervjuo kun Hans Amund Rosbach.

Interŝtataj organizaĵoj (Komisiito: R. Bugge-Paulsen). La komisiito daŭre kunlaboradis kun Ernfrid Malmgren pri la «Parlamentara Kampanjo» kaj denove kolektis proponantojn pri U.E.A. kiel kandidato por la Nobel-premio 1968. Li ankaŭ verkis gravan artikolon por la debat-kaj kulturpaĝo de Arbeiderbladet.

Blinduloj. La komisiito, Otto Prytz, daŭre funkciis kiel sekretario de la Esperanto-konsilantaro de «Norges Blindeforbund», kiu iniciatis premian konkurson pri lernado de Esperanto inter blinduloj. Kluba Bulteno de Klubo Esperantista en Oslo estas surbendigata por la blindaj membroj, kaj oni klopodas trovi aranĝon por surbendigado ankaŭ de Norvega Esperantisto. La komisiito verkis, por «Norges Blinde», artikolon pri la feria seminario de blindaj esperantistoj en Rheinbreitbach.

Skoltoj. La komisiito, Hans Amund Rosbach, sukcesis aperiĝi artikolon en «Speideren», ĝi vekis iom da intereso, kaj li daŭre tenas kontakton kun interresigantoj. Li ankaŭ klopodis, per «Norsk Speidertguttforbund», atentigi norvegajn vizitantojn al tendaro en Essex, ke Esperanto tie oficiale estos dua lingvo.

Junularo. Ankaŭ dum 1967 ne funkciis komisiito. Oni serĉas novan komisiiton.

Faksekcio por Instruistoj estis gvidata de Astrid Mansrud. Ŝi vane kunvokis kunvenon de instruistoj dum la 40a Norvega Esperanto-Kongreso en Sauda.

Esperanto en la lernejoj (prez. de la Komisiono por Lerneja Kampanjo: C. Støp-Bowitz). Daŭre venis neniu eho al la rezolucio sendita de la landa kunveno 1963 al ĉiuj norvegaj instruistoj kaj lektoroj esperantistaj kun rekomendo klopodi pri akiro de permeso por eksperimenta instruado de Esperanto en siaj lernejoj. — Aliflanke Hans Amund Rosbach per prelego al la gimnaziana societo en Kristiansund N. sukcesis vekii intereson inter la gimnazianoj de tiu urbo, kaj la societo akceptis rezolucion al «Norges Gymnasiaatsband» petante ke tiu organizaĵo postulu akcepton de Esperanto kiel elekta lingvo en la nova gimnazio.

Informaj prelegoj. Reportiĝis 4 infor-

maj prelegoj en Kristiansund N., Oppdal kaj Tynset, kun sume proks. 200 aŭskultintoj.

Nordlanda Esperanto-Komitato (reprezentanto de N.E.L.: C. Støp-Bowitz). La komitato daŭre ne montris aktivecon.

DIVERSAĴOJ

Norvega Esperantisto. La redakcia komitato konsistis el Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg (ĉefredaktoro) kaj Hans Amund Rosbach, Kristiansund N., redaktoro de «Norvega kroniko» estis Karsten Langsholt, Sarpsborg. La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj kiel en 1966. Oni disponigis paĝon en ĉiu numero al N.E.F.A., kaj la «Fervojista paĝo», sub redakto de Odd Kolbrek, fariĝis ŝatata legaĵo ankaŭ de nefervojistoj. — La kompostadon kaj presadon transprenis «Østlendingens Trykkeri», Elverum, kiu bone kaj akurate laboras, sed la unuaj numeroj iom malfruiĝis pro manko de supersignaj litertipoj. La multjara ekspedito, Tharald Dybing, post n.ro 5/6 ne plu havis okazon prizorgi la ekspeditadon. Du numerojn ekspedis Harda Danielsen, de n.ro 9/10 Kjell Gustavsen transprenis la taskon. — Aperis 6 ordinaraj numeroj 16-paĝaj kaj 2 duoblaj numeroj 16-paĝaj, sume 128 paĝaj. La evitono de 8-paĝaj numeroj ebligis la interkonsento kun N.E.F.A. kaj anoncoj el Sauda. Tamen la enspezoj ne permesis eldonon de 10 plenaj 16-paĝaj numeroj.

«Pro Merito». Ordena promocio okazis dum la festeno de la 40a Norvega Esperanto-Kongreso en Sauda, la 14an de Majo. Komandoro de la 2a klaso fariĝis Elna Matland, Kavaliroj de la 1a klaso Bjørn Ottesen kaj Tharald Dybving, Kavaliroj de la 2a klaso Sigmund Blikshavn, Ole Johan Rønnevig, Erling Vorland.

Biblioteko. La pruntedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de N.E.L., la ceteraj estas sekure magazinitaj. La kresko de la biblioteko ĉefe rezultis el recenz-ekzempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto, kaj gazetoj ricevataj interŝanĝe kun ĝi. Pruntedoniĝis 13 libroj.

«Reisetråfikkforeningen for Oslo og Omegn». La kunlaboro kun tiu asocio fariĝas ĉiam pli ampleksa. Pluraj kopioj

de ĝia filmo «Bonvenon al Oslo» daŭre cirkuladas en la mondo. Klubo Esperantista en Oslo distribuadis pli 112 000 ekzemplarojn de la turistbroŝuro al petintoj en 49 landoj. Fine la asocio havigis 7 seriojn da diapozitivaj kun akompana prelegteksto en Esperanto, kiuj nun, apud la filmo, cirkuladas en la mondo.

Turisma Servo de N.E.L., sub gvidado de Kirsten Ek, peris informojn kaj aliĝojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Tel Aviv kaj preparis karavanon. Ĉar la kongreso fine okazis en Rotterdam, iris tien nur 3—4 norvegoj. Oni aranĝis karavanon el orienta Norvegujo al la Norvega Esperanto-Kongreso en Sauda. — Aŭtune la Turisma Servo dissendis informojn pri la 53a Universala Kongreso en Madrid.

Internacia organizo. La kunlaboro kun U.E.A. estis kontentiga. Ĉefdelegito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Komitatano A de N.E.L. estas Ludvig Anjer. C. Støp-Bowitz estas Komitatano B. Anjer partoprenis la Komitatkunsidojn dum la kongreso en Rotterdam. En 1967 estis 62 Delegitoj en 21 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de U.E.A. estis 92. En la konkurso de U.E.A. Norvegujo nun estas lokigita en la dua grupo, (landoj kun malforta movado), kie ni atingis la 9an lokon, kun 72,14 %.

Nobel-premio de paco al U.E.A. La propono pri U.E.A. kiel kandidato estas ripetita por 1968.

52a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Rotterdam. Aliĝis 11 norvegoj, sed ne ĉiuj ĉeestis. La Norvegan Registaron reprezentis Ludvig Anjer, reprezentanto de N.E.L. estis Olav Thormodsen.

Prelegvojaĝoj. Printempe oni aranĝis prelegvojaĝojn por la israelano Itamar Even-Zohar al Okcidenta Norvegujo kaj al Trøndelag.

Helpagado. Oni daŭrigas la kunlaboron kun Mocambiko kaj kun Esperantista Asocio de Madagaskaro.

«Vivo de Zamenhof». La transprenita stoko de la norvega eldono de Privat: «Vivo de Zamenhof» estas disvendata por kr. 3,00, sed la disvendado ne okazas kontentige vigle.

«Norsk Kulturråd». Petskribo pri subvencio al Norvega Esperantisto kaj aliaj celoj estis rifuzata.

Kartoteko pri norvegaj esperantistoj. La kartoteko enhavas nun 9433 slipojn pri esperantistoj en 748 lokoj. Slipoj pri kursanoj de la lastaj jaroj estas skribitaj, sed ankoraŭ ne envicigitaj.

Koresponda statistiko. N.E.L. kun ĉiuj sekcioj dum la jaro ricevis 1342 leterojn kaj 1128 presajojn kaj sendis 1301 leterojn kaj 2874 presajojn.

La intereso pri Esperanto evidente ekzistas latente, sed necesas veki ĝin. Ke tio estas ebla, pruvis nia fervora rekta membro, s.ino Julie Romsdal en Alta, kiu sukcesis aperigi longan artikolon pri Esperanto en pluraj gazetoj de Norda Norvegujo, en kiu ŝi enŝovis la adreson de N.E.L., kio rezultigis multajn petojn pri informoj kaj kelkajn novajn lernantojn de la koresponda kurso. — Per la malapero de Esperanto-nytt ni perdis nian eble plej bonan aktivigilon. La Liga Estraro decidis reaperigi ĝin, necesas ke la Informa Fako nun efektivigu la decidon. — Nia «sistema varbado» estas regule aplikata al ĉiuj interesigantoj, kio rezultigas regulan alfluan de precipe rektaj membroj. — Parto de la gazetaro kontentige publikigadis pri Esperanto.

Konkludo. Ankaŭ 1967 montras malkreskon de la membronombro, kiu jam estas danĝere malalta, kaj konsistas nun ĉefe el maljuniĝantaj fideluloj. Estas *urĝe necese* renovigi la membraron, antaŭ ĉio per junaj fortoj. Konsiderante la laborplanon de N.E.L. ĉiu klubo kaj ĉiu membro *devas* streĉi ĉiujn fortojn por denove kreskigi la membronombro.

Oslo, la 31an de Decembro 1967
la 6an de Majo 1968

C. Støp-Bowitz Kjell Gustavsen
John Berggreen Signe Korstvedt
Karl Ekehaugen
Olav Rygg Kirsten Ek

La kalkuloj de Norvega Esperantista Ligo

SPEZOJ 1967

<i>Enspezoj:</i>	
Klubkotizoj	5 306,00
Rektaj membroj	2 367,30
Rentumoj	305,14
Gazeta kurso	100,00

<i>Elspezoj:</i>	
Kostoj	1 662,90
Norvega Esperantisto	4 404,92
Afranko	949,62
Gazetara Servo	315,15
Kotizoj al U.E.A.	451,00
Kotizoj al la Distriktoj	178,50
Al la kapitalo: gajno	116,35
	<hr/>
	8 078,44
	<hr/>
	8 078,44
	<hr/>

BILANCO JE 31/12 1967

<i>Aktivaĵoj:</i>	
En la kaso	542,33
Poŝtgirokonto 100.30	972,88
Meblaro	702,88
÷ amortizo	70,00
	<hr/>
«Pro Merito»	632,88
243 akcioj en Esperantoforlaget	286,09
Debitoroj:	5 346,00
Oslo Sparebank	9 663,37
Andresens Bank	12 354,83
Div. debitoroj	1 152,64
	<hr/>
	23 170,84
	<hr/>
	30 951,02
	<hr/>

<i>Pasivaĵoj:</i>	
Div. kreditoroj	2 533,93
La kontorfondaĵo	4 257,48
+ donacoj	1 601,15
	<hr/>
÷ lupago	5 858,63
	2 055,00
	<hr/>
«Esperanto-nytt»	3 803,63
La Propaganda Fondaĵo	2 690,26
+ donacoj 1967	9 291,73
+ rentumoj	570,00
	371,64
	<hr/>

÷ elspezoj	10 233,37	
	1 065,49	
Garantifondaĵo dumvivaj membroj		9 167,88
Loterio		617,00
Konservataj klubkasoĵ		3 082,65
Kapitalo	8 114,30	825,02
+ gajno	116,35	
		8 230,65
		30 951,02

Oslo, la 31an de Decembro 1967
la 6an de Majo 1968

Karin Sandberg, John Selbekk
revizoroj

Karl Ekhaugen
kasisto

La Korespondaj Kursoj

(Avdeling for Brevundervisning)
SPEZOJ 1967

<i>Enspezoj:</i>		
Kurskotizoj		722,75
Rentumoj		177,91

<i>Elspezoj:</i>		
Studmaterialoj kalkulitaj	490,00	
Kostoj	194,00	
Afranko	54,47	
Al la kapitalo	162,19	
	900,66	900,66

BILANCO JE 31/12 1967

<i>Aktivaĵoj:</i>		
En la kaso	7,79	
Poŝtĝirokonto 100.33	1 019,11	
En la Poŝta Sparkaso	2 245,99	
Forretningsbanken/Nordenfj. Kreditb.	3 605,49	
Studmaterialo	3 600,00	
<i>Pasivaĵoj:</i>		
Kapitalkonto		
Saldo je 1/1 1967	10 316,19	
Al la kapitalo	162,19	10 478,38
	10 478,38	10 478,38

Taps- og vinningskonto er satt opp etter kassa-dagbok med bilag, som er revidert. Postgirokonto og bankbøker stemmer med ovenstående tall i status.

Trondheim, den 6. juni 1968.

Else-Margrethe Müller,
kasistino.

Erling Anker Haugen,
revizoro.

Sciigoj de N.E.L

Aŭtuna kursagado. Ankaŭ en 1967 le perdo de membroj estis pli granda ol la aliĝo de novaj membroj. Nun vere urĝas haltigi tiun bedaŭrandan tendencon. La sola medikamento kontraŭ tiu malsano estas aranĝado de *kursoj*. La Liga Estraro tial insiste admonas al ĉiuj klubaj estraroj tuj kunveni por plani aranĝon de kursoj dum la venonta aŭtuno. Spertoj el iuj lokoj jam montris ke per insistita laboro oni povas kolekti interesigantojn por kursoj. Sed necesas plani la kursagadon en bona tempo. *Do, ekegu jam nun!* N.E.L. estas preta helpi per kursmaterialoj kaj konsiloj. Ŝtatan subvencion por salajro de la kursgvidanto oni povas ricevi. Kie neniu loka samideano povas gvidi kurson, oni klopodu fondi studrondon por komencantoj per la koresponda kurso. Petu pri nia studplano. Krome oni klopodu igi lokan gazeton publikigi la gazetkurson (skribu al N.E.L. pri plano kaj provleciono). Sed komencu jam nun prepari la aŭtunajn kurson! — N.E.L. havas ankaŭ pli ol 100 rektajn membrojn. Certe multaj el ili ankaŭ povus starigi kurson aŭ studrondon. Ni tial direktas ĉi tiun alvokon ankaŭ al ili. Ni petas ĉiun rektan membron, kiu estas preta fari klopodon en tiu direkto, skribi al N.E.L., kaj ni plezure helpos ilin. Post kurso aŭ studrondo oni povos fondi Esperanto-klubon en la urbo, kaj estas tre dezirinde fondi klubojn en multaj novaj lokoj.

Taskotabelo por la kluboj. — *Junio:* La estraro planas la aŭtunan laboron kaj precipe decidas detalojn rilate la aŭtunajn kursojn.

Julio: Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 1-a jarduono, kun studraporto dorsflanke (blankedo A 10/E 1).

Aŭgusto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro zorgas pri kursejo kaj kurspropagandiloj.

Septembro: La kursoj komenciĝas. La studgvidanto refunkciigas la studrondojn kaj fondas novajn. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

La Liga Estraro.

Chu aperos Plena Ilustrita Vortaro?

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) anoncis, ke ĝi efektive eldonos la manuskripte jam pretan Plenan Ilustritan Vortaron, kiam ĝi havos la pruvon, ke almenaŭ 2000 personoj estas pretaj mendri kaj pagi ĝin. U.E.A., kiu forte deziras apogi tiun necesegan entreprenon, alvokas al ĉiuj, kiuj pretas aĉeti la P.I.V., skribi tion deklari.

La konata Plena Vortaro de Esperanto de E. Grosjean-Maupin k.a. unue aperis en 1930. De tiam ĝi fariĝis ne malhavebla posedaĵo por ĉiu serioza uzanto de la lingvo. Ĝi akiris krome grandan prestiĝon kaj certe havis pli grandan normigan influon al la lingva evoluo, ol kiu ajn alia publikajo post la Fundamento. Tamen ĉiu vortaro iom post iom malaktualigis kaj postulas revizion. La ĉefa parto de Plena Vortaro ne ŝanĝiĝis de post 1934, kaj eĉ la bona Suplemento de prof. Waringhien jam aĝas preskaŭ 15 jarojn. La natura evoluo kaj kompletigo de la vortprovizo de Esperanto urĝe postulas novan, maksimume kompletan vortaron.

Kvankam la ideo de Plena Ilustrita Vortaro estis jam en 1953, kiam prof. Waringhien verkis la Suplementon de PV, «longe karesata revo», kaj sekve des pli longe karesata ĝis hodiaŭ, nur antaŭ nelonge la kolosa laboro de kompilado kulminis kaj la tajpado de la manuskripto finiĝis. Dum multaj jaroj prof. Waringhien dediĉis sin preskaŭ ekskluzive al la laboro super PIV, dum multaj jaroj li konsultadis la plej kapablajn kunlaboran-

tojn pri diversaj fakoj kaj interakordigis la konsilojn.

Estus krimea indiferenteco, se la publiko nun lasus tiun tute prespretan manuskripton ŝimi en angulo. Necesas ĝin eldoni.

La eldonistoj, SAT, jam detale esploris ĉiujn konkretajn kondiĉojn por la eldono, kaj restas nur la demando, ĉu la merkato estas preta. La libro estos impona volumo de 1584 paĝoj (PV havas nur 576) en la formato 14 x 19,5 cm (proksimume kiel «Leteroj de Zamenhof» aŭ la plej nova eldono de «Fundamenta Krestomatio») kaj kun solida tola bindaĵo. La ilustraĵoj ampleksos 10—12 kompletajn paĝojn. Pri la nivelo de la enhavo la reputacio de la prezidanto de la Akademio, prof. Waringhien, estas pli ol sufiĉa garantio.

La vendoprezco kalkulita de la eldonistoj estas 69 guldenoj (276 steloj aŭ ekvivalento). Ĉu alta? Oni konsideru, ke la kompostado de vortaro estas tre komplika kaj longedaŭra, sekve ankaŭ multekosta; ke la eldonkvanto por Esperanto-vortaro povas esti nur malgranda procento de tio, kio estas normala por nacilingva vortaro franca, germana aŭ simila; ke la eldonistoj jam 18 monatojn serĉadis de unu presejo al alia por trovi la plej malaltan prezon atingeblan. Je la prezo de unu kongreskotizo aŭ du tranoktoj en bona hotelo oni ricevos vortaron same aŭtoritatan kiel «Plena Vortaro» sed senkompare pli kompletan — vortaron, en kiu troviĝas ĉiuj plej modernaj terminoj por ĉiuj fakaj, hejmaj, literaturaj kaj aliaj medioj. Per la elspezo de 69 guldenoj oni akiros imponan verkon, kiu laŭ sia kompleteco eltenos komparon kun la plej konataj vortaroj de la ĉefaj naciaj lingvoj kaj kiu signifos netan kaj videblan antaŭenpaŝon por la tuta afero de la Internacia Lingvo.

Plena Ilustrita Vortaro aperos — se 2000 personoj nun promesas, ke ili ĝin aĉetos. Ne necesas sendi monon tuj. Simple prenu poŝtkarton kaj skribu: «Responde al la alvoko de SAT mi firme kaj formale promesas aĉeti kaj pagi P.I.V., kiam nova komunikilo aperos en la Esperanta gazeto. Mia nomo kaj adreso estas...» La poŝtkarton tuj sendu (aerpoŝte el ekster Eŭropo) al: Libroservo

de U.E.A, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. De via decido dependas la sorto de la plej bona vortaro en la historio de Esperanto!

La Estraro de U.E.A.

RECENZOJ

Edwin de Kock: Fajro sur mia lango. Poemaro. Prologo de Baldur Ragnarsson. J. Régulo, La Laguna 1967.

Denove bela beletra kajero, eldonita de J. Régulo, La Laguna, sub titolo «Fajro sur mia lango». Kontraste al la unua poemaro «Ombroj de la kvara dimensio» Edwin de Kock nun uzas kvin-jambojn, tiel kutimajn en la angla lingvo. Trokeoj kaj jamboj dependas de la koncerna lingvo. Ekzemple la angla kaj Skandinava estas trokeaj, kun ĉefakcento sur la unua silabo: river, conference, highway, elven, hestene, bjørkeskog Metante senakcentan silabon antaŭ tiuj vortoj oni ricevas la jamban metrikon. Esperanto sekvas la latinajn lingvojn kaj ricevas la ĉefakcenton sur la lasta (se apostrofita) aŭ antaŭlasta silabo. Ĉar la natura akcento en bona poemo devas kunfali kun la metrika akcento, aŭ inverse, tute nature Esperanto devas sekvi la latinidajn skemojn.

Bona poemo devas esti pli ol vortoj, ĝi devas esti muzikaĵo, kiu sekvas certan svingigon, dependante de la ĉefakcentoj, silaba nombro, kaj nombro de piedoj en ĉiu verslinio. La naturaj akcentoj devas per si mem doni la ritmon. Tial multfoje al la duonakcentitaj vortoj: «mia, tia, kiam, tiel» oni devas doni plenan akcenton — sed kelkfoje ankaŭ meti sur la lokon de senakcenta unusilabo, tiameniere rompante la naturan ritmon. Edwin de Kock donas al tiuj vortetoj plenan akcenton.

Sajnas, ke la poezia vortaro kreskis per ankoraŭ kelkaj vortoj. Kio estas «koŝmaro»? Antarktika besto mara? Mi longe serĉis la vorton en leksikonoj, kaj fine mi per la kunteksto eldivenis la vorton «inkubo» kaj trovis ke estas

franca vorto kun la formo «cauchemar». Per tio ĉi mi ne volas diri, ke neologismoj devas esti malpermesataj, sed almenaŭ oni devus ilin registri. Mi citas la plej kutimajn: Lanta (kial ne: lenta?), tarda, frida, empatio?, Koŝmaro, kurta, povra, febla, ento, klami, primavero, opresi, hororo, streta, vringi, tenebro.

La poemaron malfermas aŭtaŭparolo de Baldur Ragnarsson. La poemoj estas profundsencaj kaj spanas trans multspeca temaro, de l'epoko de la Sumeroj kaj antikvaj Romianoj ĝis Adolf Hitler kaj nov-faŝismo. Sed subbrulas en ili la fajro de la rasa konflikto de lia malfeliĉa lando Sud-Afriko. Al poeziamantoj mi varme rekomendas la verkon. Mi finu per la poemo Sud-Afriko:

«Tage nubskrapaĵoj, kiel fungoj
del'epoko, reklamas siluete
sian okcidentecon, dum la ungoj
de la nokto restas inge, prete.
Sed kiam la vespero de kapurbo
ruĝpiede marŝas en la ondojn,
kaj dronas kie foje la perturbo
de blankulaj ŝipoj importis mondojn
fremdajn post vizaĝoj nordepalaj,
tiam reposedas ĝi la landon.
Vente iras muĝoj prabubalaj,
kaj la timo plantas sian plandon
apud la koron, kiam Io venas
trans la stepojn ĝis l'unuaj domoj,
kaj sin pezaspire nur fortrenas,
frumatene, kun la frostfantomoj.
Sur la kontinenta nigra sino
pezas ŝarĝ' de konscienco kaj destino.

H. Fr.

Pioniro forpasis

La ĉefa gvidanto de la esperanto-movado en Hamar, inĝeniero Johan Andreas Kleven, mortis pro korinfarkto la 14an de aprilo 1968.

Li naskiĝis en Trondhejmo la 26an de aŭgusto 1893, praktikis en la elektra fako 1909—15, studis elektroteknikon dum 2 jaroj en Trondhejmo kaj poste dum 2 jaroj en Germanujo. En 1921 Kleven plenumis inĝenieran ekzamenon, kaj de 1926 li estis inĝeniero ĉe NSB en Hamar. De 1945 li krome instruis pri elektrotekniko ĉe la Teknika Vesperlernejo en Hamar.

Kleven fariĝis esperantisto jam en 1916 pere de la dana lernolibro de Zoffmann. Poste li partoprenis kurson de Johan Løvli en Trondhejmo. En 1931 Kleven aranĝis la kursojn de la Ĉe-instruisto Ottmar Fischer en Hamar kaj fondis la klubon «La Norda Stelo», kies prez. li estis en 1931—32 kaj 1959—60. Li estis delegito de UEA por Hamar 1931—36 kaj depost 1953. En 1957 NEL honorigis lin per PRO MERITO (Kavaliro de la 2a klaso).

Li estis ankaŭ aktiva membro de Norvega Esperanta Fervojista Asocio de ĝia fondo en 1949, kaj en 1965 li estis membro de la Loka Kongresa Komitato por la 17a IFEF-kongreso en Hamar.

La forpaso de Kleven estas granda perdo por nia movado. Pacon al lia cindro!

LKH



Aagot Sletterød forpasis

La 17an de Junio post longa malsano forpasis honora membro de N.E.L. kaj de Klubo Esperantista en Oslo, s.ino Aagot Sletterød.

Kiel esperantistino jam de 1912 Aagot Sletterød estis unu el la fruaj pioniroj de Esperanto en nia lando. Ŝi estis membro de la unua klubo en Oslo kaj fondinto de la nuna, kies prezidanto ŝi estis dum pluraj periodoj. Dum duona jarcento ŝi estis ĉiam aktiva en plej diversaj manieroj, kaj dum la plej malfacila periodo, de ĉirkaŭ 1920 ĝis 1932 kune sia edzo, O. Brochmann Sletterød, ŝi konservis la esperantan flamon viva en nia lando. Ĉiam ŝi havis bonajn ideojn, kaj ŝi sciis realigi ilin por vigligo de la kluba vivo. Aparte menciinda estas ankaŭ ŝia granda intereso pri la blinduloj kaj ŝia labtoro por disvastigi Esperanton inter ili, kiel la komisiito de N.E.L. pri blindulaj aferoj dum multaj jaroj. Pro sia nelacigebla aktivado ŝi fariĝis Granda Oficiro de la kluba ordeno «La Verda Pantoflo» kaj Oficiro de la 1-a grado de «Pro Merito».

Ni ĉiam memoros ŝin kun amo kaj danko, kaj deziras pacon al ŝia memoro.

C. Stop-Bowitz.

Norvega Kroniko

Jarkunvenoj

Jarkunveno de Ascendo okazis en Amvojetoj 23b ĉe la prezidanto. La tuta estraro estis reelektita.

Oni diskutis la eblecojn de novaj antaŭenpuŝoj de Esperanto. Oni devas ĉesi la teoriajn kverelojn pri la lingvo kaj anstataŭ tio uzi ĝin amplekse en la internacia vivo. Jam nun la esperantistoj ja estas sufiĉe nombra popolo kaj devas senti sin kiel tia, almenaŭ uzante la lingvon inter si, kaj nacie kaj internacie. Oni devas trovi novajn metodojn por la instruado por ne esti distancata de la t.n. mondlingvoj. Oni devas ligi la praktikan vivon al la lingvo. La perfektigo de la lingvo devas okazi paralele kun la praktikado. Esperanto devas antaŭ ĉio montri rezultojn. Propagandoertas bona sed povas ankaŭ efiki dormige.

En la internacia interŝanĝo de Esperantistoj ankaŭ la lokaj kluboj devas partopreni. Eminentuloj Esperantistaj devas esti intervjuataj en radio kaj televido, ĝuste kiel aliaj eksterlandaj personoj.

Devas ekzisti interkomuniko inter la kluboj ankaŭ sur la loka plano. Antaŭ ĉio la kluboj devas fortigi la komunecon inter la membroj kaj aliaj kluboj, per kunvenoj regionaj, kursoj someraj, kampaj ekskursoj, diskutkunvenoj, festkunvenoj. Eble la dividon en grandaj regionoj landpartaj devas transpreni pli konvenaj unuoj malgrandaj, sed kiuj sekvas la aktualan situacion kaj bezonon, ekz. Østfolda regiono, Hedemarka regiono, Okcidenta regiono (kiel nun), Nordlanda (kiel nun), eble ankaŭ Sudnorvega. Oslo kaj Bergen kaj Trondhejmo apartaj unuoj.

Post la diskuto oni delikatis sin per bongustaj kukoj kaj pantranĉoj kaj kafbabilis krokodile. La reston de la vespero oni aŭskultis al muzikaj frandaĵoj el magnetofono, klasikaj kaj pop'aj, prezentataj de nia plej juna membro, Øyvind.

Kunvenreferato de «La tri verdaj steloj de Løten»

Marde la 2an de aprilo estis kunveno en «La tri verdaj steloj de Løten» hejme ĉe Georg Syversen.

Ceestis 9 membroj kaj 1 gasto, Per Engen de Hamar.

Ĉar nun estas decidite, ke Norvega Kongreso okazu en Budor Turisthytte en Løten pentekoste 1969, estas nature, ke tiu arango estis la ĉeftemo por la diskutado.

Ni esperas ke la komunumaj instancoj dediĉu sennoman vojon al la Esperantomovado, kaj al ĝi ni dum ceremonio, en kunlaboro kun kanthoroj kaj muzikkorpusoj de Løten, volas doni la nomon: Esperantovegen.

La programon ni nun volas ellabori en detaloj, kaj ellabori buĝeton.

Post la diskutado ni rigardis la belege koloritan filmon pri la Fiat-entrepreno en Torino, kun bonega parolteksto en la Internacia Lingvo.

S-ro Syversen donis al ni bongustan kafon kaj abundaĵon da simile bongustaj kukoj, kaj je h.21.45 ni forlasis lian agrablan hejmon.

Anna Solveig Krogstie.

26/10. Ĉar nek la prezidanto, nek la vicprezidantino havis okazon ĉeesti, O. Thormodsens malfermis kaj gvidis la kunvenon.

Post malferma kanto, la parolo estis transdonata al s-anino LIV VIK kiu denove nin kunvojaĝigis al interesaj lokoj en Eŭropo kaj Usono.

Ŝi prezentis plaĉajn kaj karakterizajn kolorlumbildojn pri la konata nederlanda liliputa urbo Madurodam, pri giganta Nov-Jorko kun UNO, la vigla urbo Detroit kaj la Lagoj. Fortege impresis la majesta NIAGARA. Inter la lumbildoj estis ankaŭ fragmentoj el la urb-domo de Oslo. Estis tre sukcesa programo kun Liv Vik kiel bona vojaĝgvidantino kaj s-ino Sortland kiel prizorgantino de la lumbild-aparato. La geklubanoj dankis per kora aplaŭdo.

Estis laŭtlegata interesa letero de nia vojaĝanta s-ano, ŝipdirektisto Arne Alne.

La libro-komisulo zorgis pri vendado de Esperantaj libroj, kaj kiel kutime estis kantado kaj agrabla kafopaŭzo.

Nia klubano Sigv. S. Ege donacis al la klubo ĉarman pupeton nacikostume vestitan, kiun la klubo ellotadu por plibonigi la ekonomion.

Rap.

TRI POEMOJ

FIŜINIDO KAJ KATIDO

— FABLETO —

Vivis ĉarma fiŝinido,
ekamis ŝin la katido:
en akv' loĝis fiŝinido,
ekster akvo la katido.

«Dolĉa, eta fiŝinido,
— diris al ŝi la katido —
estu mia fiŝinido,
tre amos vin la katido.»

«Bele de vi ho, katido
— respondis la fiŝinido —
venu tien ĉi katido,
kaj amos vin fiŝinido.»

Vane vokis fiŝinido,
nur rigardis la katido:
fornaĝis do fiŝinido,
sola restis la katido.

ĈU MI, AŬ NI?

Ĉu mi kaj mi
kaj denove mi
kaj eterne mi?
Ne! . . . Ne! . . . Ne! . . .
Ululas
la kolerema ĉielo,
ĝi estas
tre, tre amara mielo.

Sed ni kaj ni
kaj denove ni
kaj eterne ni!
Jes! . . . Jes! . . . Jes! . . .
Ĝi estas
la sola ĝusta vivvojo,
ĝi estas
la sola dolĉa vivgojo.

LA FANFARONULO

Ĉio estas ega kaj heroa faro,
kion faras li, li, la fanfaronulo:
sed vi faru ion, aŭ via najbaro,
ĝi estos malbona, ĝi estos grandnulo.

Batas sian bruston, ke li estas iu,
kaj fiere iras li preter la homo:
kvankam estas li tre, tre eta nenui,
ne pli ol lanugo, maksimume komo.

Ju pli oni vivas
per tio, ke estas li ega grandiu,
des pli ĉiu vidas,
ke ja estas li nur tre eta nenui.

GYULA B. BÉRCZESSI

Klubo Esperantista en Oslo

22/4. 68. Post la bonvensaluto la prez. John Berggreen donis la parolon al Randolph Grotmål, kiu rakontis pri siaj «Memoroj el 4-jara restado en Islando».

La preleganto tre interese kaj en bona Esperanto rakontis pri la ofte nomata «Saga Insulo», sed fakte ĝi estas moderna lando. Ĝi ne estas glacilando, sed ĝi estas verda — tamen senarba. Ĝi estas lando inter fajro kaj glacio, ĉar ĝi havas multajn vulkanojn, varmajn fontojn kaj glaciejojn. Per la akvo de la varmaj fontoj la islandanoj hejtas siajn domojn kaj forcejojn, en kiuj lastaj ili kultivas legomojn kaj fruktojn. Randolph Grotmål akompanigis sian prelegon per multaj treege belaj kolorlumbildoj de ĉiuj partoj de Islando, kaj la ĉeestantoj montris sian antuziasmon kaj kontenton per forta aplaŭdo.

Dum la «10-minuta lingva instruado» John Berggreen montris diversajn grupojn de esperantaj vortoj, kiuj povas esti tradukataj norvegen per la sama norvega vorto, sed tamen per Esperanto oni povas pli ekzakte esprimi la nuancojn. Li konkludis per diri ke Esperanto havas multajn vortojn kun la sama signifo norveglingve, sed per Esperanto oni ofte povas esprimi plej detalajn kaj ekzaktajn konceptojn.

C. Støp-Bowitz prezentis saluton de s-ino Haudebine, kiu denove laboras por Esperanto en Hindujo.

Harda Danielsen.

Korespondu!

50-jara bulgaro deziras korespondi kun norvegaj esperantistoj. Stoian Hristov, str. «Al. Stamboliski» n.ro 51, *Burgas*, Bulgarujo.

Mi deziras korespondi kun genorvegaj. Mi interesiĝas pri ĉio. Maria Kiedrowska, str. IV Poprzeczna 6 m 4, *Warszawa-Anin*, Pollando.

Ni estas tri junaj amikoj, kiuj volas korespondi kun geesperantistoj el Norvegujo pri diversaj temoj kaj eventuala vizito. Ni estas studentoj en la supera Maŝin-Elekta Instituto, lasta jaro. Angel Hristov Todorov, strato «Patriarh Eftimi» 98, *Sofia*, Bulgarujo (interŝanĝo de ilustritaj poŝtkartoj, filatelio), Ivajlo Bogdanov Brakalov, strato «Krun Popov» 84, *Sofia*, Bulgarujo (poŝtkartoj kaj diskoj), Peter Angelov Todorov, strato «Zar Samuil» n.ro 111, *Sofia*, Bulgarujo (tehnikaj temoj kaj Esperantaj revuoj).

Fervojista Pagho

Pro subita ŝanĝo de presejo okazis miskompreno, tiel ke oni publikigis la materialon por du numeroj en la pasinta. Tial vi ne trovas apartan fervojistan paĝon en ĉi tiu numero, kion ni sincere bedaŭras.

La red.

Nils H. Midthus 95-jara

La 25-an de aprilo instruisto Nils H. Midthus atingis sian 95-an datrevenon. Li naskiĝis en Lysekloster kaj estas filo de la fondinto de la esperantomovado en Norvegujo, Haldor Midthus. Nils Midthus plenumis la instruistan ekzamenon ĉe la seminario en Stord 1894 kaj praktikis kiel instruisto en Hegglandsdal kaj Lønningsdal 1894—1905 kaj en Lysekloster 1905—1933. Dum multaj jaroj li estis estro por la prizorgo de maltriĉuloj en Os kaj direktoro de la privatbanko tie. Nils Midthus lernis Esperanton en la jaro 1905 de sia patro. Depost 1909 li abonis je Norvega Esperantisto kaj depost 1911 li estas membro de Norvega Esperantista Ligo. Nils Midthus estas fervora esperantisto kaj konservas multajn valorajn skribaĵojn pri la unua periodo de nia movado en Norvegujo. Li estas interesita en muziko kaj poezio kaj mem komponis kaj verkis. Li ankaŭ trovis tempon por terkulturado flanke de sia instruista agado.

Mi renkontis Nils Midthus en 1953 kiam mi iniciatis starigon de memorŝtono por lia patro kaj havis la okazon ekkoni lin per korespondado kaj vizitado en lia ĉarma hejmo en la idilia loko Lidarås. Gastema kaj bonkora persono li estas. La esperantistoj kiuj konas vin persone au per nomo sendas plej korajn gratulojn kaj bondezirojn!

Johan Matland.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urgaj sendaĵoj.
Telefona: 54 727